

Jesus Moinhos Pardavila

La arkitekturo de deziro en la verkoj de Lajos Tárkony

Enkonduko

Elstara voĉo en la Budapeŝta Skolo, Lajos Tárkony (1902-1978) postlasis al ni eseojn kolektitajn en *De paĝo al paĝo* (1932), la poemkolekton *Soifo* (1964), verkitan dum pluraj vivperiodoj, faskon da versaĵoj dissemitaj en diversaj revuoj, kaj unu rakontan provon. En lia poezia produktado konstateblas latentaj amdeziro, ĉefteme aksanta multajn liajn poemojn. En ĉi tiu eseo mi klopodos priskribi, kiel la poeto evidentigis la deziron en sia verko, kaj reliefigi la kondiĉojn, al kiuj ĝi estis submetita. Samtempe kun tio, mi esploros komunajn ecojn kun aliaj poetoj kaj tradicioj, referencojn por enkadrigi liajn verkojn. Mi sekvos perspektivon enkadrigitan en la t.n. *queer studies*.

1. La ŝranko¹ kiel unueciga aspekto

Pri la personeco de Lajos Tárkony (antaŭ la dua mondmilito Ludoviko Totsche) pluraj nerektaj aludoj al samseksamo aperis jen kaj jen, ĉiam en vualita formo. K. Kalocsay (1962, 1964) diras, ke "Li estis senĉese enamiĝinta al iu/aŭ al io: romano, poemo, muzikpeco, pejzaĝo" kaj taksas lin "beladoranto de mimoza animo". Pli eksplicita estas J. Pleadin (2006): "La plumnomo Lali Blond (proponita de Kalocsay) estis trafa masko por la gracia, blondbukla kaj virineca aspekto kaj karaktero de Tárkony". Sed kio estas "virineca karaktero"? Ĉu vere oni povas aserti, ke la poezio de Tárkony, en siaj temoj kaj strukturoj, estas *genre* ina, se entute eblas tion diri? En sia priskribo Pleadin uzas la literaturan lokuson de invertiĝo: *anima muliebris in corpore virili inclusa*², tradicie troveblan en la okcidenta kulturo por ekspliki samseksamon. Do, verdire Pleadin volas sugesti *gejo* aŭ *samseksamulo*, same kiel Giorgio Silfer (1977) faris tridek jarojn antaŭe, sin helpante de tipa priskribo psikanaliza pri kazo de samseksamo:

¹ Mi uzas *ŝranko* kun la signifo, kiun donis al ĝi Ricardo Llamas (1994): "la institucio propra al niaj socioj ĝenerale enfermantaj kaj tenantaj en kaŝeco gejojn kaj lesbaninojn".

² 'Virina animo enfermita en vira korpo' (latine).

Forte ligita al sia patrino, kaj poste al la ununura fratino, timida kaj rezervita, praktike li ne sukcesis sekse maturiĝi; pri kio Kalocsay mem parte kulpis, pro terura ŝerco dum UK en Pollando. Post tiu okazaĵo la budapeŝta klaĉemo ne lasis lin trankvila: ĝi eĉ ne respektis lian eventualan bildon ĉe juna fremdulo.

Tiun anekdoton ankaŭ mencias, pli detale, Ertl (1990) en sia monografio pri la aŭtoro: "per pordofrapado ili [Baghy kaj Kalocsay] fiaskigis multpromesan rendevuon lian kun polino en lia hotelĉambro". Sed tiun amon ne la du hungaroj, sed la milito morte nuligis (Kalocsay 1964); ĝi inspiris al Tárkony la 12-sonetan³ serion "In memoriam tuam". La amato estas karakterizata nur de kelkaj trajtoj, kiuj ne ebligas scii lian sekson: li estas *bela, juna, svelta, freŝa*, belgenua, *rozarna*, bluokula kaj *blonda*. La similo inter la du viroj (karakteraj, sed ankaŭ korpa) tralikas el la lasta terceto de "Liberiĝo":

*nun volis mi spegule vizaĝon vian luli.
Kaj tra okuloj viaj mi vidis respeguli
min mem, ha, kristalklare, kaj de mi mem libere!*

Eble la plej interesa poemo en tiu ciklo estas "Sekreto", parolanta rekte pri la ŝranko kiel cenzura institucio⁴:

*Inter ĉi brila verdo, florbunto, florodoroj,
sentante sur mi spuron de via ambrakumo,
mi volus nian amon rakonti al la lumo,
al vento lacflugila, al herboj kaj al floroj.*

*Sed babilemaj estas la floro, herb' kaj vento,
do pri sekreto nia mi restas en silento,
gardante ĝin sur fundo de l' koro frenezeta.*

En la longa "Mia avino Panonia" li diras:

*Kaj mi adoleskis,
sekretaj sopiroj kaj tristoj en mi kreskis*

³ Plus la enkonduka soneto. En *Soifo* ĉiun parton akompanas prezenta poemo.

⁴ La grasaj literoj estas miaj.

probable aludante sian samseksamon en la adoleska tempo, grava momento en la t.n. konsciiĝo pri seksa orientiĝo (Soriano 1994, 2004). Spuroj de tiu sama sekreteco estas troveblaj en la frua poemo "Adiaŭo", kie la amantoj sidas en "soleca benko" ŝirmitaj de pinaro, kiu "postenas post ni". En antaŭa versio de la poemo, aperinta en *Literatura Mondo* kaj *Dekdu poetoj*, la arboj pli intense "gardstaras". La poeto prezentas tute ne konvencian *locus amoenus*⁵, kie regas deviga privateco. En la ŝranko-reĝimo privateco kaj intimeco ne estas rajtoj aŭ elektebloj, sed altrudoj — temas pri la *bonsocia* devigo kaŝi tion, kio laŭ ĝi neniam devus publikiĝi (Llamas kaj Vidarte 1999). Sekreto povas funkcii kiel subjektiva praktiko, per kiu kreiĝas la kontraŭoj privata/publika, interne/ekstere, subjekto/objekto; en ili la netuŝebleco de la unua termino estas neŝanĝebla, ŝanĝimuna (Mérida Jiménez 2011). Ne vane Tárkony (Totsche 1931), en sia recenzo pri *Se grenereto...* de Kenelm Robinson (K. R. Sturmer) asertas, rilate la gejteman novelon "Apud la stacidomo Victoria", ke ĝi "estas verkita por malmultaj". Tiun socian malpermesecon la poeto vortumas jam en la poemo "Belo", antaŭ la supre menciita ciklo:

*En nepenetrebla solo de marmora solen' statua,
kiun baras fortimiga-altirega cirklo tabua,*

La sistema evitado de ekspliciteco konstateblas ankaŭ en la tuta poemaro⁶. Tárkony uzas genre neŭtrajn substantivojn, neniam informante pri la sekso de la amato: "homo", "figuro", "iu". Ankaŭ la korpopartoj ne aparte montras tiurilate, ĉar ili ne estas specife viraj aŭ inaj: *haroj, kapo, mano, okuloj, genuoj, kokso, buŝo, lango*. Tiu sinteno draste kontrastas kun tiu de lia admirata Kalocsay, kiu en siaj poemoj ne hezitas eksplicite⁷. Tiel, la ŝranko devigas Tárkony uzi privatan lingvaĵon kapablan peri proprajn situaciojn, travivaĵojn sen moko, rido aŭ timo pri aresto. Ĝi materiigigas en lia ĉambro en Lógodi-Strato, lia izolejo plurfoje menciita laŭlonge de la poemaro. Ekster ĝi la socio aŭdigas siajn "malicajn sonojn" (poemo "Krepusko en la urbo"). En la poemo "Esperanto" li asertas, ke dum li troviĝis "en kreskanta, subprema izolo", la internacia lingvo "estis mia sola konsolo".

⁵ Amloko (latine).

⁶ Malgraŭ tio, ke nevidebleco plifortigas la sociajn premmekanismojn (Larios, 2011).

⁷ Tamen Kalocsay ne rivelas la sekreton de Tárkony kaj plu kaŝludas en siaj tekstoj pri li: "amataj estaĵoj", "amo", "persono".

Tárkony ludas per la transireco de genro, laŭ kiu li alproprigas al si *filinecon* (kontraŭante la binaran *heteronormon*), en poemo publikigita dek unu jarojn post *Soifo*: "Mia fratino" (Tárkony 1975). En ĝi li prikantas fratecan amikecon kun virino, Irena⁸. La poemo valoras pli pro sia enhavo ol pro sia formo, kaj en ĝi la poeto diras:

*fratinon mi deziris, kaj, finfine,
fratin-kompense, iom knabineske,
mi mem fariĝis, kiun mi deziris
kaj la patrin' deziris: fratineto.*

Lia loĝejo estis detruita de bombo dum la milito, kune kun lia amata biblioteko. Post tiu okazintaĵo kaj la hardaj sekvoj (Tófalvi 2012) Tárkony hungarigis sian nomon kaj lia poezio draste turniĝis centrifuge el la ekstera mondo, ne plu elmetante kiel ĝis tiam sian internon. Tiuperiodan komenciĝon signas en *Soifo* la parto trafe titolita "Haŭtsanĝo".

2. La aplomba ĉeesto vira

Kontraste kun la ĵus menciita nedifineco rilate priskribojn de la amata persono, Tárkony sin delectas pri viraj bildoj jen kaj jen en sia literatura produktado. En la komponado de la partoj de sia poemaro li uzas kronologian ordon; tamen ene de ĉiu li aranĝas la poemojn laŭ sia persona prefero. Tiel, en la unua parto de *Soifo*, "Fruaj poemoj", post la neintensa enkonduka poemo "Post dek jaroj" li enkojnas "Al moderna knabo", aperintan en *Literatura Mondo* monatojn post aliaj kiel "Momentfoto", "Triopa trista gard" kaj "La lumgardanto"⁹. La kialo estis simpla: "Al moderna knabo" estas ŝlosila poemo por kompreni la ceteran libron, esenca teksto, el kiu oni ĉerpu la konon por interpreti la poezian produktadon de Tárkony. En ĝi la poeto verŝas sian erotan admiron al junuloj, kaj li volis, ke ĝi estu en la komenco de la libro. La poemo strukturiĝas laŭ skemo komenciĝanta per alparolo, dediĉo kun klasikaj ecoj adresita al la junulo. Sekvas unuversa strofo anoncanta la rakontaĵon. Ambaŭ strofoj kunefikas por

⁸ Ertl (1990), konfuzite, kredas la fratecan amikinson alispeca amo: "trovo tarda, sed ne malfrua de koramikino", kvankam Tárkony celas klarecon kaj por tio insistas poemfine: "fratina mildo kaj fratina ĉarmo, / fratina viglo kaj fratina varmo, / fratina kiso de fratino Irena".

⁹ Konkrete, tiuj tri poemoj aperis respektive en 1931-06 (junio, p. 108), 1931-09 (oktobro, p. 186) kaj 1931-10 (novembro-decembro, p. 207). "Al moderna knabo" estis publikigita en 1932-11 (novembro, p. 180).

solenigi la tutan poemon, por gravigi la enhavon substrekante ĝin kaj preparante la leganton por atentopostulo. Alvicigi la tria, kun lokaj kaj tempaj informoj. En la sekvaj partoj la poezia voĉo — kiu, pro la biografia karaktero de la poemaro, identiĝas kun la aŭtoro mem — priskribas la knabon. La unuaj informoj montras la junulon en momento orgasmeska:

[...] *Jen, suspiro de admir'*
mi aŭdas. Mi rigardas al apuda seĝ'
kaj vidas vin kun brusto leviĝinta al
la lumobildo, kun ekscitotrema lip'
kaj kun vizaĝo fajra de plezurekstaz'.

Venas iom poste korpa priskribo. La knabo estas montrata kun tre virecaj atributoj, kun granda muskolaro, kiun la vestaĵoj vane provas enteni. La bildo estas ŝarĝita de forta erotika enhavo:

Mi vin observis ŝtele. Tra la duonlum'
albrilis min la juna helo de l' harar';
vijaj muskoloj fortaj, via kreska korp'
ŝveligis viajn knabajn vestojn ĝis kreviĝ'.

La poezia voĉo konsideras la knabon ĉampiono en sportado ("triumfan ĉiam, venkan ĉiam per la fort' / de via junco"). La tuto memoras pri la okcidenta klasika kanono de beleco kaj prezentas la junulon kiel grekan *koúros*. En la antikva Grekujo sporto simbolis seksan energion, kaj palestroj estis lokoj kaj por sportkonkuradoj kaj por seksaj inicoj. Ankoraŭ nuntempe, en la okcidenta (kaj ne nur) socio, sportado montras la volon triumfi en sekso kaj sano (Llamas kaj Vidarte 1999). Tiel, la knabo estas prezentata kiel perfekta amanto. En la antaŭlasta strofo plian klasikan noton donas la komparo kun "la subjuginto de Aleksandri".

La kinejo iĝas nova spaco resignifigita, rompanta la unuecon de la tradiciaj signifantoj rilataj al deziro. La poezia voĉo/aŭtoro, sidanta en sia izolo, ŝirmata de la obskuro, sentas la kinejon kiel etendiĝon de sia sekura ĉambro. Li alprenas la teniĝon de rigardanto, de kaŝa observanto, *voyeur* de la apuda belo, kun la anksio kaj envio diversgrade troveblaj en ajna admiro ("Premis min rezignaci' / envia"). Fakte, li ne nur kaptas la belon rekte tra kontemplado, sed li intuas aliajn aspektojn, kiujn li ligas kun belo.

Lasciva observo de generaj organoj montriĝas en la malfrua poemo "Unua duopo"; la abunda interpunkcio de la lasta verso de la strofo redonas la ekscitiĝan anhelon:

*Mia rigard' gluiĝis al via kurb' genua
kaj, dum la vivrakonton vi lirlis pastorale,
ĝi glitis volupteme, senhonte, kanibale
alsupre, plue, plue, al loko, ve, **tabua**.*

Tute alian rigardon ni renkontas en "Marta renkonto". Temas ĉi-foje pri rigardo hazarda inter du personoj (denove intence sen seksa indiko), en publika loko, komprenita kiel ŝanco kuniĝi ame, sekse, kiel aliro al feliĉo, kiu diskonturiĝas en la eventualo. Jen la du tercetoj:

*Tra l' strato brue svarmis popolo eleganta
en vestoj disflorantaj, kaj, dum pri l' bildo vanta
vi gapis — blonda, svelta figuro alrapidis.*

*Inter vi pont' momenta: interrigardo arkis,
jam vin altiris io, sed ĉio preterglitis
kaj kune la Feliĉo... Ĉu vi eĉ ne rimarkis?*

Ĝi estas la sama rigardo trovebla en "La vitrino de l' tabakisto" de Kaváfis, montranta hazardan renkontiĝon inter du samseksamuloj en soci-prema etoso¹⁰:

*Apud vitrino prilumita
de tabakisto inter aliaj ili staris.
Hazarde renkontiĝis la okuloj
kaj la deziron kontraŭleĝan de ilia karno
esprimis time kaj hezite.
Post maltranvkilaj paŝoj al la trotuaro —
ili ridetis kaj kapjesis jam senzorgaj.*

¹⁰ Mi kopias fragmenton el la esperanta traduko de "Tordamanto", el Benoît Philippe (1994, p. 60). Estas tre malprobable, ke la poezio de *Soifo* estis influita de tiu de Konstantínos Kaváfis (1863-1933). Nur postmorte la poemoj de Kaváfis publikiĝis libroforme (De Villena 2002), kaj la unua hungara traduko aperis en 1968.

En "Al moderna knabo" sekvas meditado pri tio, kion helenoj nomis *kairós*: la konveneco aŭ oportuneco por la seksa plezuro aŭ *aphrodisia* (Foucault 1998). Tárkony volas defluigi la streĉon de la versoj en la neeblo kune sporti kun la junulo, sed por la leganto tio evidentiĝas sinpraviga masko, kiu vane klopodas malpliigi la forton de la antaŭaj erotikaj versoj. Aliflanke, en la opono *moderneco, korpa kulturo/malnoveco, libra kulturo* (ĉi lastaj, kun kiu identiĝas la poezia voĉo, redistancigas ĝin de la moderna knabo-deziroobjekto) la poeto remencias la atentokaptan "muskola brak". Al admiro pri muskolaj viraj korpoj Tárkony revenas en postaj poemoj, kiel "Nordo":

*Vi, fortbrakaj faligantoj de pinarbaroj krutmontaj,
firmplandaj fiŝantoj de profundoj tempestondaj,
muskolaj minantoj de fero,*

ankaŭ en "La unua de Majo":

*Laboristoj larĝabrustaj kaj atletoj ŝvelmuskolaj kaj aĝuloj rektanukaj
kaj ridantaj knabinetfestonoj kaj junuloj kun la lipoj eklanugaj,
kaj sportuloj, kies haŭto brune brilas de l' karesanta sunoro,*

kaj en la "Suspiro" titolita "Naĝo", reven-teme pri kaŝkontemplado kaj tempopaso:

*Kaj ŝvelajn bankostumojn sur la plaĝo
vi povas ŝtele gvati kiel iam!*

Tiu sento distanciga kaj do frustra de la tempo estas konstanto en liaj poemoj, jam de la unuaj. En "Al moderna knabo":

*[...] Premis min rezignaci'
envia, ĉar mi plu ne estas homoplant'
floranta, juna, freŝ-elasta kiel vi...*

*Pardonu min! Sed sur la sojlo de l' virag'
tiel doloras la renkonto al la jun'!*

Pro tiu neeblo estiĝas sento pri soleco fontanta el konsciiĝo pri la radikala alieco de la kontemplaĵo (Larios 2011). Tiu soleco estas alia ĉefa temo de la poezio de Tárkony, kaj ĝi similas pro sia naturo la solecon en la verko de Cernuda¹¹:

¹¹ La hispano Luis Cernuda naskiĝis, kiel Lajos Tárkony, en 1902 kaj mortis en 1963.

Junuloj
neniam estintaj miaj vivkompanoj,
adiaŭ.

aliflanke, oldo kruda, humiliga.

[...]

Junuloj
neniam estontaj miaj vivkompanoj,
adiaŭ.

Oldula man' makulas
junan korpon se ĝi volas ekkaresi.
Kun soleca digno maljunulo devas
preterpasi apud la malfrua tento.

Kompleta vivodaŭro nin disigas
nesupereble:
unuflanke, juno rida kaj libera;

Ĉe ambaŭ poetoj junuloj montriĝas kiel ama-seksaj objektoj neatingeblaj pro la tempopaso kaj aĝdiferenco¹².

Ankaŭ en la malfrua poemo "Vespermanĝo" Tárkony, post ekstaza supeo ("mi havas ĝuon vere jam voluptan"), similigas la lipojn de "kelnerbubo" kun eble la plej erota frukto en la okcidenta kulturo, en kanona komparo¹³:

Ni sidu iom. Fine do: la pago.
La konton ŝika kelnerbubo skribas,
ridetas liaj lipoj kiel frago.

Aparte surpriza estas la titolo de poemciklo dediĉita al helenaj kaj romiaj verkistoj: "Antikvaj amatoj". En ĝi Tárkony ludas vekante la scivolemon de la leganto. Li uzas la socian diskriminacion tiel, ke ĝi estu profitdona al li, sen ajna risko, ĉar temas pri malnovaj beletroamaj. Romo kaj ĉefe Grekio estas konotaciitaj kiel lokoj (pratempaj kaj geografiaj) kie samseksamo rajtas ekzisti¹⁴. Tio vicigas Tárkony en eŭropan tradicion, al kiu apartenas verkistoj de la 20a jarcento kiel E. M. Forster, Roger Finch, Eugénio de Andrade, Claude Michel Cluny, Fernando Pessoa, Sandro Penna aŭ Konstantínos Kaváfis.

¹² Fragmentoj el la poemo "Despedida" ("Adiaŭo) de Cernuda (1985). La elhispanigo estas mia.

¹³ Vidu, ekzemple, en konata poemo de la nikaragvano Rubén Darío (1984) tradukita de Fernando de Diego: "La princino tre tristas... Kio do ŝin torturas? / Ŝia buŝo frageska ve-suspire murmuris".

¹⁴ La t.n. *greka amo* trovis sian kulturan praviĝon en la verkoj de Platono, dum longa tempo referenco en la havebla geja literaturo.

La helena inspiro igas lin krei specialan parton en *Soifo*, nomatan "Hellado", en kiu li reverkas sinteze Odiseadon kaj poemas pri diversaj mitoj. En lia tre persona elekto troviĝas negravaj roluloj, kiel la juna paŝtisto Endymion, traktita en la samnoma versaĵo. Por li Tárkony ne ŝparas laŭdajn priskribojn: "junul' belega", "la belega korpo juna" aŭ "la rava knabo". Narciso (en "Narkissos kaj Eĥo") aperas kiel "junul' orhara, lilisvelta [aŭ poste: floroĉarma], / nektarolipa, ambroziokarna". Siavice, Tithonos (en "Eos kaj Tithono") montriĝas "knabo inda je adoro, / bela kiel statuo de marmoro", kaj lia filo Memnono estas "junul' de tia belo brila", kiu "inter la trojanoj kaj la grekoj / per bel' nekomparebla li majestos". La amataj junuloj de Tárkony aperas kiel praaĵ, eternaj mitoj¹⁵.

Iom antaŭe en *Soifo*, la 17-poema ciklo "Kosmo" estas lia propra portreto:

URANO

*Morna soleca olda fraŭl' Urano,
virin-evita vaga veterano,
kion vi faras sen flegad' virina,
kiam vi feblas febre de malsano?*

Efektive, soleco kaj maljuneco estas du ĉefaj temoj en la poemoj kaj persona vivo de Tárkony; jarojn poste li denove priskribis sin mem kiel "olda fraŭl'" (Tárkony 1975) en poemo publikigita en *Hungara Vivo*. Li estis ankaŭ "virin-evita"¹⁶, ĉar samseksamulo, kaj ofte suferis febrojn, kion atestas poemoj en *Soifo* kiel "Febro" kaj "En hospital-fenestro". Tiel, interna interteksteco rolas kiel komprenilo. La respondo al la demando-poemo kuŝas en la titolo mem: Urano, la greka pradio de ĉielo, estis kastrita de sia filo Krono, kaj el liaj generiloj, ĵetitaj en la maron, naskiĝis Afrodita Urana, menciita en *La bankedo* de Platono. Surbaze de tiu kromnomo de Afrodita Karl Heinrich Ulrichs (1825-1895), unu el la unuaj geaj aktivistoj, kreis la substantivojn *uranismo* kaj *uranisto*, respektive kun la signifoj 'samseksamo' kaj 'samseksamulo'. Tiuj

¹⁵ Junuloj, ĉi-foje bilardantaj, aperas ankaŭ en la sola novelo de Tárkony, "Perdita posttagmezo" (Blond 1935). En ĝi la korpopriskribo de rolulino tre kontrastas kun la pentrado de virkorpoj en liaj poemoj. Tárkony elektis ne belan priskribon, sed disdegnan: "Ŝi aspektis 40-45 jara, nigrulino, iom altstatura, balastaj brustoj, fortikaj kruroj, ampleksa postaĵo. Ŝiaj trajtoj estis krudaj kaj lacaj".

¹⁶ "Virinevita" de seksa kaj ama vidpunktoj, kompreneble. En *Soifo* li dediĉis poemojn al virinoj, interalie al siaj patrino kaj avino, Hilda kaj Helmi Dresen, Marjorie Boulton, Clelia Conterno, Borbala Szerémi-Tóth kaj mitologiajn kaj legendajn virinoj de Grekujo. Krome, li verkis poemon al sia fratino en *Hungara Vivo* (Ertl 1990).

terminoj hodiaŭe ne plu estas uzataj, sed de tiam Urano restis ligita al la koncepto *samseksamo* (Lauritsen kaj Thorstad 1977). La poemoj de la ciklo "Kosmo" parolas ĉefe pri astronomio, jen kaj jen ŝprucita per mitologio; nur "Urano" parolas pri tute alia afero – pri la poeto mem.

3. Konkludoj

Lajos Tárkony vivis en malfacila epoko por esti gejo: ĝis 1961 samseksamo estis konsiderata krimo en Hungario. Tio devigis lin konstrui sian deziron laŭ la socipolitikaj cirkonstancoj, ankaŭ en sia verkaro. La ŝranko, en kiu la ekstero retenis lin, allasis al li nur la vojon de neŭtra nedefiniteco por paroli pri amoj. Tamen, en sia poezio, ĉefe en sia vivoverko *Soifo*, li brave enmetis ŝlosilojn por kompreno. La libro, konceptita kiel tuto unueca, provizas per lerta interna interteksteco la necesan konon pri la aŭtoro en la sfero de deziro. Tiu deziro ne montriĝas laŭ la aksoj natura/nenatura aŭ vero/malvero: la koncepto *perversio* absolute forestas en liaj versaĵoj, male ol ĉe aliaj samepokaj poetoj, kiel Cernuda. Malgraŭ la konstanta bedaŭro pri tempo (-paso, -distanco) kaj geografia diseco, lia amdeziro havas pozitivan konotacion. La poezio de Tárkony prezentas plurajn komunajn trajtojn kun tiu de aliaj gejoj poetoj de la 20a jarcento, al kiu ĝi kompareblas rilate literaturan ellaboron. Rimarkindas, el alia vidpunkto, ke sendube Esperanto rolis kiel kodo, kiu permesis al li ne tro elmeti siajn verkojn al la "malicaj sonoj" de la socio, en kiu li vivis.

Bibliografio

- Blond, Lali 1935: Perdita posttagmezo. En: *Literatura Mondo*, junio 1935 (5), 98-99.
- Cernuda, Luis 1985: *La realidad y el deseo*. 1924-1962. [Naŭa represo]. México: Fondo de Cultura Económica.
- Darío, Rubén 1984: "Sonatino". [Traduko de Fernando de Diego]. En: *Boletín* 263, majo-junio. 17-18.
- De Villena, Luis Antonio de 2002: *Amores iguales. Antología de la poesía gay y lesbica*. Madrid: La esfera literaria, 137.
- Ertl, István Lajos 1990: *Tárkony kaj la Budapeŝta Skolo (Literatura Studo) kaj Kronologia Bibliografio de Lajos Tárkony*. Wien: Pro Esperanto.
- Foucault, Michel 1998: *História da Sexualidade. O Uso do Prazer*. Glória: Edições

- Graal, 38-50.
- Kalocsay, Kolomano (red) 1934: *Dekdu poetoj*. Budapest: Literatura Mondo.
- 1962: Lajos Tárkony. En: *Hungara Vivo*, 1962 (2), 6-7.
- 1964: Antaŭparolo. En: Tárkony, Lajos 1964, 9-14.
- Larios, Jordi 2011: El 'quehacer de mirar': notas sobre la poética de Luis Cernuda
En: *Journal of Iberian and Latin American Studies*, vol. 17 (2/3), 121-132.
- Lauritsen, John, kaj Thorstad, David 1977: *Los primeros movimientos a favor de los derechos homosexuales (1864-1935)*. Barcelona: Tusquets.
- Llamas, Ricardo 1994: Amosal para el armario. La dimensión institucional del ocultamiento. En: *De un plumazo*, 4, 8-11.
- Llamas, Ricardo, kaj Vidarte, Francisco Javier 1999: *Homografías*. Madrid: Espasa-Calpe.
- Mérida Jiménez, Rafael M. 2011: Queerencias: Literaturas hispánicas y estudios LGBTQ. En: *Lectora*, 17, 9-13.
- Philippe, Benoît 1994 (red.): *Glauka lum'*. *Geja antologio*. Viena: Pro Esperanto.
- Pleadin, Josip 2006: *Ordeno de Verda Plumo. Leksikono pri esperantlingvaj verkistoj*.
Đurđevac: Grafokom, 230-31.
- Silfer, Giorgio 1978: *Enkonduko al Literatura Kritiko. SUK-Kursotekstoj 30*. Liège: Someraĵ Universitataj Kursoj, 35-39.
- Soriano, Sonia 1994: A toma de conciencia na orientación sexual. Prelego el II Xornadas de Sexualidade. Homosexualidade. Facultade de Psicoloxía, Universidade de Santiago de Compostela, la 2-an de majo.
- 2004: Adolescentes gais y lesbianas en el ámbito educativo: análisis de la realidad y líneas generales para una propuesta educativa. En: *Orientaciones*, 9-34.
- Sutton, Geoffrey 2008: *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto 1887-2007*. New York: Mondial.
- Tárkony, Lajos 1964: *Soifo*. La Laguna: Stafeto.
- 1975: Mia fratino. En *Hungara Vivo* 1975 (6), 3.
- Tófalvi, Éva 2012: Rolo de la persona faktoro en la Esperanta literaturo: La verkisto.
En: Lipari, Michela, kaj Tonkin, Humphrey (red.): *Pri homoj kaj verkoj. Eseoj pri la Esperanto-kulturo*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 15-23.
- Totsche, Ludoviko 1931: "Se grenereto..." [recenzo]. En: *Literatura Mondo*, februaro 1931 (2), 31.

